

# Iomete pri la kontaktoj kun internacia ILEI

2005-dec

- ILEI decidis en novembro 2005 ke la kongrestemo 2006 estu: ”Lingvaj rajtoj, lingvolernado kaj eduko por ĉiuj”. De ĉirkaŭ 20 sekcioj venis tradukoj en ĉies nacian lingvon. Legu pli en [www.ilei.info/vikio/Konferenca\\_Temo](http://www.ilei.info/vikio/Konferenca_Temo)
- Respondo al la peto de Mihai Trifoi, sekciestro en rumana ILEI, pri la argumentoj de la petskribo de la sveda sekcio de ILEI al la ministro pri Egaleco en aŭgusto 2005

*Argumentoj:*

1. Malgraŭ la fakto ke pli kaj pli da lingvoj estas uzataj en EU la plejparto de la lernantoj studas nur la anglan, devige por ĉiuj. Ni volas grandigi la intereson ĉe gimnazioj por lingva egaleco.  
*(La poenta sistemo por eniri universitatojn bedaŭrinde ne favoras lingvojn sed pli rapidajn mallongajn kursojn. Estas diskuto pri tio. La instruistoj pri lingvoj trovas, ke iliaj instruhoroj daŭre malkreskas.)*
2. Nun estas Esperanta kurso en la universitato de Umeå. Oni devas komenci la studadon jam en la gimnazioj.
3. Esperantoinstruistoj troviĝas dise en la lando.
4. La Homaj Rajtoj de UN artikolo 26:2 diras: ”Eduko celu la plenan disvolvon de la homa personeco kaj plifortigon de la **respekto al la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj**. Ĝi kreskigu **komprenon, toleron kaj amikecon inter ĉiuj nacioj, rasoj aŭ religiaj grupoj**, kaj antaŭenigu la agadon de Unuiĝintaj Nacioj **por konservo de paco.**”

*Aldonitaj: la statuto de la sveda sekcio de ILEI kaj la Pragmanifesto.*

## **La projekto** (mallongigite)

*Nomo:* Lingva egaleco – esperanta projekto por gimnazioj

*Projektposedanto:* La estraro de la sveda sekcio de ILEI

*Kion ni volas fari:*

1. Informi pri Esperanto en kiel eble plej multaj gimnazioj.
2. Esekunkurso (svede) inter la gimnazioj: ”Lingva egaleco”.
3. Eldono de libro kun la plej bonaj eseoj, tradukitaj en Esperanton. Paralelaj tekstoj svede – esperante. Kune kun la bonega lernolibro EPoGo (Esperanto por gimnazioj) la gimnazioj povas legi ĝin dum la dua studsezono.
4. Instigi gimnaziajn instruistojn lerni Esperanton.

Antaŭvidata rezulto: Pli granda konscio pri lingva ekvilibro en la mondo kaj pli granda intereso pri Esperanto.

#### UNUA PERIODO: Printempo 2006

- Kontaktoj kun rektoroj kaj instruistoj pri la sveda
- Informlecioj al gimnazianoj kaj instruistoj, pri Esperanto kaj pri la esekonkurso
- Informo al rektoroj pri nia ebleco instrui al grupoj kiuj elektus Esperanton kiel libere elektitan fakon
- Informo pri nia ebleco eduki gimnaziajn instruistojn en esperantoinstruistojn
- Kontaktoj kun la du svedaj esperantaj eldonejoj kaj aliaj eldonejoj

#### DUA PERIODO: Septembro – decembro 2006

- "Ileanoj" kaj aliaj E-instruistoj vizitas la gimnaziojn, prefere kune kun iu junulo, kiu havas propran sperton de "Esperanto kiel libere elektitan fakon" aŭ kiu vojaĝis per helpo de Pasporta Servo
- La gimnazianoj ricevos broŝurojn pri Esperanto kaj la instruistoj havos la regulojn por la esekonkurso
- La estraro de la sekcio havos longan kunsidon por diskuti la eseojn kaj dividos la plej bonajn inter si por traduko

#### TRIA PERIODO: Januari – majo 2007

- Novaj vizitoj al la klasoj. Montro de provekzempleroj de la libro. Renkonto kun personoj kiuj espereble volos studi Esperanton
- Elekto de eldonejo

#### KVARA PERIODO: Junio – oktobro 2007

- Presado de la libro. Dissendo al la gajnintoj kaj al UEA (senkoste), al gimnazioj, E-kluboj (laŭ antaŭa mendo)
- Dusemajna eduko de instruistoj en Esperantogården, Lesjöfors
- La aŭtuna studsemajno: Esperanto kiel libere elektita fako
- En kelkaj gimnazioj: eduko de instruistoj en Esperanto

#### KVINA PERIODO: Oktobro – decembro 2007

- Labortaksado
- Artikoloj en E-revuoj, revuoj por instruistoj kaj en ĉiutagaj gazetoj

*Kio okazis ĝis nun al la petskribo, unue sendita en aŭgusto?*

1. La oficejo de la ministro pri egaleco plusendis la petskribon al Näringsdepartementet (la Industria Departemento) ĉar ja temas pri mono.
2. Du sekcioj en Näringsdepartementet traktis la aferon, sed trovis ke ĝi ne estu ilia respondeco.
3. Oficisto telefonis kaj proponis ke ni sendu la petskribon al Invandrarvedrket (la migrula buroo), ĉar tie troviĝas mono. Ni protestis: ne estas enmigrado, sed afero pri egaleco. Alia propono: sendu la petskribon al Utbildningsdepartementet! (la departemento pri edukado). – Pli bone, sed ni persistas: temas pri egaleco.
4. Alvenis leteron de Näringsdepartementet, dirante: – Ni plusendis vian petskribon al

Utbildnings- och kulturdepartementet.

Tia estas la nuna situacio en novembro 2005.

*Interese: En oktobro parlamentano kreis proponon pri Esperanto en la lernejoj ekde la sepa klaso (13-jaruloj) kaj en la gimnazioj. Do Utbildningsdepartementet esploras du priesperantajn skribojn samtempe. Iam en malfrua printempo la parlamento traktos la proponon. Nia petskribo estas plej simpla kaj ni devus havi respondon en januaro – februaro, mi imagas.*

*Fino de la sendita respondo.*

---

Bone havi kunlaboron kun aliaj sekcioj de ILEI kaj kompreneble ankaŭ kun la svedaj esperantoorganizaĵoj.

*Siv Burell*

© Svenska sektionen av ILEI, <http://ilei.info/svedio>